

Unu el la juveloj de nia poezio : *La Ezopa Saĝo* de Kálmán Kalocsay

Claude Gacond, 95-a radioprelego, 1964.09.23 & 26

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri unu el la juveloj de nia poezio : *La Ezopa saĝo* de Kálmán Kalocsay. Vi aŭdas Claude Gacond.

Vi eble posedas la libron titolitan *Ezopa Saĝo*. Ĝin versadis nia poeto Kálmán Kalocsay en lingvo simpla, sed tamen vortare riĉega. Tiu verko estis eldonita en 1956 de la kopenhaga eldonejo Koko. Mia espero estas, ke post mia elsendo vi havos la deziron relegi tiun fablaron. Kaj se vi ne posedas ĝin, ke vi tuj provos ĝin akiri pere de la esperantista libro-vendisto en via lando.

Estas libroj, kiuj fariĝas niaj nedisigeblaj amikoj. Ni metas ilin apud nia lito aŭ sur nia labor-tablo por povi konversacii kun ili kiel eble plej ofte. *La Ezopa Saĝo* de Kalocsay estas por mi unu el tiuj viv-kunuloj, kiujn oni eĉ metas en la valizon, kiam oni forveturas, unu el tiuj kunuloj, kiuj fariĝas tiom vivaj, kiel estaĵo. Estas, ke en ĝi vivas multaj sagacaj bestoj, kies instruoj nin helpas en nia serĉado de la vero.

Ofte, kiam mi sidas antaŭ mia tajpilo, atendante verk-inspiron, miaj okuloj turniĝas al tiu kunulo kaj miaj manoj kvazaŭ religie trafolumas ĝiajn arte dekoraciitajn paĝojn. Kion plej multe admiri kaj ŝati : ĉu la saĝon de Ezopo, kiu venas al ni el la pratempo kaj tamen tiom aktualas ? ĉu la viglecon de la lingvo de tiuj fabeloj, kiu naskas en ni fieron kapabli legi la mondan lingvon ? ĉu la kvaliton de la desegnaĵoj de Børge Hamberg, kiu faras de tiu libreto veran art-trezoron ?

*Ezopo ! Ĉu li estis, aŭ ne estis ?
Oni rakontas... oni... svaga oni...
Li, tamen, eĉ se li ne vivis, vivas.*

Per tiuj antaŭparolaj versoj Kalocsay esprimas nian senton. Ezopo por ni vivas. Lia neordinara parol-povo akirita dum la dormo de la Artemis-paŝtinoj inspiris dum pli ol dumil kvincent jaroj milojn da poetoj kaj milionojn da legantoj. Tra la reverkado de La Fontaine tiu saĝo estis rememorigita al la franca Sunreĝo kaj al liaj korteganoj. Hodiaŭ dank'al Kalocsay la sama saĝo estas rememorigata al la homaranoj. Aŭskultu ĝin :

Leona divido

*Foje la lupoj kaj la vulpoj kaj la kat'oj
kun la leono sin federis por ĉasad'oj.
Ĝrandkorpan cervon predis la ĉasanta kvar'oj
kaj la leono ĝin dividis per deklaroj :
« Leono mi estas : Mia la unua parto'oj.
Plej forta mi estas : Mia do la dua parto'oj.
La trian rajtas mi : la plej kuraĝa best'oj,
kaj ve al tiu, kiu tuŝos al la rest'oj ! »*

Ĉu tiuj dividoj ne rememorigas al vi kelkajn nuntempajn leonajn dividojn? Dum ni parolas pri leono, ni legu la fablon **Nur unu, sed...**

*Vulp'oj al leono diris kun mokridoj :
« Al vi naskiĝas nur po unu ido. »
Respondis tiu en fiera ton'oj :
« Nur unu, sed leon'oj ! »*

Eble la biologiaj konoj de Ezopo estis iom primitiva, sed ne lia rakontmaniero.

Ni tre ŝatas **La instruon de la cervino**, kiu tiom sprite priskribas nian sintenon antaŭ danĝero. Aŭskultu :

*Cervin'oj instruis la cervidon :
« Estu kuraĝa, havu fidon*

Unu el la juveloj de nia poezio : *La Ezopa Saĝo* de Kálmán Kalocsay
Claude Gacond, 95-a radioprelego, 1964.09.23 & 26

*je via forto, kornoj grandaj,
vin ĉiam certe defendantaj.
Hontinde ja, ke vin teruras
la hundoj, kaj vi treme kuras. »
Ekbojis hundoj de proksime,
rifugiĝis la cervino time.*

Ĉu ni ofte ne reagis kiel la vulpo en tiu ĉi fablo ?

La vulpo kaj la vinbero

*Allogis la vinbero, sed estis iom alte.
La vulp' klopodis longe, por ĝin atingi salte,
sed ne sukcesis, lacis, rigardis ĝin, avida,
finfine ŝultrotiris, dirante : « Eh, acida ! »*

Al la esperantistaro mankas ofte komuna kultura fonto. Plej ofte ni lernis nian lingvon aŭtodidakte, kaj pro tio ne konas niajn proprajn ĉefverkojn. Tio malebligas citi versojn el niaj ĉefaj poeziaj riĉaĵoj. Sed nun ŝajnas, ke tiu situacio ŝanĝiĝas. En la lernejoj, kie nia lingvo estas instruata, la infanoj parkeras kelkajn fablojn de Kalocsay. Dum ceremonioj ili ilin recitas. Tiel la publiko, kiu ilin konas, pli kaj pli vastiĝas. Post kelkaj jaroj, kiam iu, en supernacia rondo, prononcos tiujn du versojn :

*« Popolon falĉas armtekniko,
sed kies manoj do ĝin kreas? »*

ĉiuj ĉeestantoj tuj pensos al la fablo ***La aglo kaj la sago***. Aŭskultu ĝin kaj ekzamenu, ĉu ĝi ne taŭge difinas la hodiaŭan teknikan arton propran al la batalema homaro :

*La aglon murde trafis piko
de sag' plumita, kaj li veas :
« Ho jen, mi ne de malamiko,
sed de la propra plum' pereas. »
Popolon falĉas armtekniko,
sed kies manoj do ĝin kreas?*

La legendo volas, ke Ezopon mortkondamnis pastroj. Sed antaŭ ol esti depuŝita de roka pinto en la profundon, Ezopo per lasta fablo mokis siajn mortigontojn:

*« Se almenaŭ
mi de rajdĉeval' bonrasa
mortus, aŭ de mul' tenaca,
kaj ne de azen' nazmuka,
malkuraĝa kaj kaduka ! »*

Kaj por fini, jen ankoraŭ tre mallonga fablo titolita ***La vulpo kaj la masko***.

*La vulp' surkampe maskon trovis,
ĝin ĉiuflanke turnis, ŝovis,
kaj diris kun rikan' acerba :
« Tre bela kapo, sed sencerba. »*

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond prezentis unu el la juveloj de nia poezio: ***La Ezopa Saĝo*** de Kálmán Kalocsay.

Ĝis reaŭdo !